



TEA-BULTENO

17^A JARO

MARTO - APRILO 2014

NUMEROJ 3-4

Se vi alparolas homon en lingvo por li komprenebla, viaj vortoj eniras lian menson.
Se vi alparolas homon en lia lingvo, viaj vortoj eniras lian koron.
(Nelson Mandela, 1918-2013)

Jara Asembleo de TEA la 16^{an} de februaro 2014

Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocioj, karaj Gemikoj,

Ni ankoraŭfoje kuniĝas en nia sidejo por la tradicia ĝenerala jara asembleo de Triesta Esperanto-Asocio. Bonŝance, ĉu ne? Tio ĉi estas ja bona signo kaj pri sano kaj pri nia sindediĉo al ĝi.

Hodiaŭ ni povos pritrakti la agadon faritan en la pasinta jaro, kiu tute ne mankis, eĉ abundis malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, kaj pri kiu certe plejparte vi ne plu memoras. Cetere ... ankaŭ ne mi!

Bedaŭrinde tiu agado ŝuldiĝas al preskaŭ nur manpleno da homoj, kiuj insiste volas aktivadi kaj ne permesi, ke TEA post 108 jaroj ĉesigu sian ĉeeston en nia urbo.

Mi ne resumos kion ni sukcesis realigi en 2013, nia tre preciza sekretariino tre bone listigos al vi nian tutan agadon kaj estus tro enuige aŭdi tion dufoje.

Nur kelkajn vortojn miaflanke, kiuj certe ne feliĉigos vin!

Nia Asocio velkas..., ni bezonas novajn fortojn! Ne demandu, kiamaniere oni trovu ilin, ni provis per pluraj rimedoj, sen ricevi taŭgan respondon. Ankaŭ ĉi-jare ni ne kapablis altiri iun ajn al kursoj por lerni Esperanton. Certe devus ekzisti ia bona formulo por sukcesi, sed ni, mi, ne konas ĝin.

Kvankam ni ricevas ĉiam apogon kaj kuraĝigon en pluraj urbaj

rondoj, ni kunlaboras kun pluraj asocioj, aktive partoprenas en kultura medio ĉeestante multajn kunvenojn, akiri lernantojn kaj novajn membrojn fariĝis ege malfacile.

La ekziston de nia Asocio pravigas ĝuste la pluraj agadoj planitaj kaj realigitaj por montri publike, ke nia internacia lingvo Esperanto estas utila, ke ĝi rolas tute same kiel ĉiu alia lingvo de nia planedo en la multfacetaj kulturaj kaj homaj cirkonstancoj, ke esperantistoj ne estingiĝis kaj plue aktivas por realigo de la Zamehofaj idealoj. Sed ŝajne ĉio ĉi ne sufiĉas, ne taŭgas por iamaniere helpi en la vivo-daŭrigo de nia Asocio. Verŝajne ni eraras en la agado, ĉu metode, ĉu psikologie.

Sen novaj fortoj, sen pli junaj kunlaborantoj, kiuj certe kapablu utiligi aliajn varb-metodojn, pli modernajn, pli oportunajn por junularo, nia Asocio estas destinita al malapero. Ne morgaŭ, eble ne postmorgaŭ, sed relative baldaŭ. Ĉiuokaze la tempo ne laboras favore al ni. Sufiĉas trarigardi la liston de niaj membroj, por kompreni ke TEA-estonteco ne havas helrozan koloron.

TEA estas riĉa asocio, ne rilate monon, sed rilate memoron, historian materialon, bibliotekon. Almenaŭ ĉion ĉi oni devas savi el nuliĝo. Oni devus trovi solvon por konservi tiun ĉi gran-

dan riĉecon. Mi ege ŝatus krei iaspecan urban, aŭ regionan, muzeon, aŭ kulturan centron esperantistan, kie ĉio povu resti je publika dispono.

Sed kie? Kiamaniere? Eble iu inter vi povos doni bonan sugeston ĉi-rilate, ja ne hodiaŭ, sed en proksima estonteco. Oni akurate devus jam nun labori tiudirekten.

Tiu ĉi raporto estas iom malsama ol la antaŭaj, ne optimisma, tamen tre konkreta. Laŭ mia opinio ni devas konsciiĝi pri la situacio kaj strebi por ĝia renverso. Jes, oni povus ion entrepreni per la helpo kaj bonvolo de ĉiuj, sed ja ne facilas.

Do... mi ne finas per la samaj vortoj kiel en pasintaj jaroj. Mi nur rekomendas al vi subteni ĉiam kaj konstante kaj pli optimisme nian asocion ol tiu ĉi raporto faras. Eble estas ankoraŭ iom da tempo por modifi en bona direkto la aferon, kaj tiel permesi al TEA celebri la 200^{an} datrevenon de sia fondiĝo. Antaŭ multaj, multaj jaroj, okaze de la unua itala kongreso en Triesto, oni kreis belan bildon kun slogano "la estonteco estas nia"! Mi ne scias, ĉu vere estos tiel, verŝajne ne, sed espero estas la lasta formorti. Kaj kiel bonaj sekvantoj de Zamenhof, ni ESPERAS, malgraŭ ĉio, ĝis la lasta spiro.

Vivu TEA kaj Esperanto!

Edvige Ackermann

Atentigo!

Estas la ĝusta tempo por renovigi vian membrecon al TEA. Memoru, ke tre gravas via helpo por la plua ekzisto de Triesta Esperanto-Asocio, kies ĉefa celo estas la diskonigo kaj disinformado de nia komuna lingvo Esperanto. Eblas pagi rekte en la sidejo kaj ni tre ĝojos pro via vizito! Alia ebleco estas pagi pere de banko: bonvolu peti informojn! La kasisto peras ankaŭ abonojn al ĵurnaloj, revuoj, gazetoj, membrokotizojn de UEA, FEI kaj aliaj. Dankon pro Via subteno! *La TEA-estraro*

Agadraporto de la sekretario

Tre estimataj TEA-anoj!

La antaŭa jaro jam estas for, kaj nun estas la momento por trarigardi la faritan agadon de Triesta Esperanto-Asocio en la 2013^a jaro.

Kiel kutime, ni komencu per la diversaj okazintaĵoj.

24-an de februaro – Enkadre de la projekto “LA PATRINA LINGVO, ĈE L’ RADIKOJ DE IDENTECO”, oni festis la Internacian Tagon de la Patrino Lingvo per spektaklo, zorgita de la “Gruppo Costumi Tradizionali Bisiachi” el *Turriaco*. Ĝi titoliĝis “Dialektoj en nia regiono, vorte kaj muzike” kaj okazis en Salono *Beethoven*. Estis prezentitaj popolaj kantoj en pluraj dialektoj, akompane de akordiono, gitaro kaj aliaj popoltradiciaj muzikiloj.

10-an de oktobro – Ĉiam ene de la sama projekto, denove en Salono *Beethoven* oni surscenigis komedion de *Edda Vidiz* “*La locanda de l’omo selvatico*” per la teatra trupo “*I Commedianti di Ugo Amodio*”. La aranĝo ricevis la subtenon de Regiono Friulo Julia Venetio.

22-an de novembro – Lige al la patrino lingvo, en TEA-sidejo *Edda Vidiz* parolis pri sia libro “*ABECE, per resantar el talian int’ el Rosandra*”.

1-an de marto – Enkadre de la projekto: “LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN TRIESTO”, iniciatinta septembre 2012 far *Gabriella Valera Gruber*, en kiu kunlaboris Centro Unesko Trieste, Kulturasocio *Friedrich Schiller*, Greka Kultur-Fondaĵo kaj Triesta Esperanto-Asocio, kaj kiu ricevis la subtenon de Triesta Provinco, estis prezentitaj la du libroj de la hungara verkisto Tivadar Soros: “*Modernaj Robinzonoj*” kaj “*Maskerado ĉirkaŭ la morto*”. La libroj estis tradukitaj de Esperanto al la itala lingvo de *Margherita Bracci Testasecca*, kiu ĉeestis la prezenton faritan de d-rino *Renate Grim*. Enkondukis *Edvige Ackermann*, partoprenis ankaŭ la eldonisto *Paolo Gasparri*.

1-an de septembro – En la Infanĝardeno “*L’Arca*”, ni partoprenis en la Festo de Kulturoj kies titolo estis: POEZIO, MUZIKO, KOLOROJ, GUSTOJ, organizita de *Gabriella Valera Gruber*. Tiam oni deklamis, esperantlingve, kelkajn strofojn pri *Francesca da Rimini*, el la 5-a ĉapitro de la “*Infero*” de *Dante Alighieri*. Inter alie estis prezentita al la aŭskultantaro la projekto interreta, “*Dante Poligloto*”, iniciatita de *Giuliano Turone*,

En septembro 2013, estis lanĉita denove la konkurso pri pentroarto, sekve de iniciato de *Alessandro Soranzo*, kiu metis je dispono la monon disdonotan kiel premion. Limdato por akcepto de la verkoj estos septembro 2014 kaj premiado okazos la 5^{an} de decembro.

27-an-31-an de oktobro – Estis organizitaj la “*Aŭtunaj Karstaj Tagoj*”, ricevintaj la subtenon de Triesta Provinco. Temis pri 4-taga ekskursaro, disvolviĝinta flanke kaj post la Seminario okazinta enkadre de la Projekto Grundtvig, kies temo estas: “*Elloke tutmonden: la novaj defioj de volontulado*”. Financita de Eŭropa Unio, en ĝi partoprenas entute ses partneroj: du italaj, la aliaj – skota, pola, franca kaj litova. La projekto daŭros du jarojn, ĝis la 31^a de julio 2015. Sed ni revenu al Karstaj Tagoj: danke al ĉeesto de la esperantistoj venintaj el eksterlando, la grupeto, kiun ni akompanis tra la karsta teritorio, estis sufiĉe multnombra kaj precipe tutinternacia.

14-an de decembro – Zamenhofa Tago en TEA – En ĉeesto de geamikoj lokaj kaj el Izola, Ljubljana kaj Rijeka, oni ĝin festis per prezentado de eĉ tri libroj: “*La kapreolido Pirgo*” – tradukita el la kroata far *Josipa Katunar*; “*En la ora boato*”, tradukita de *Vinko Ošlak* el la slovena kaj “*Tie kaj tie: Karstaj itineroj*”, eldonita de Triesta Esperanto-Asocio. El la unuaj du libroj estis legitaj kelkaj signifaj pecoj, respektive de *Elena Zerpini* kaj *Janez Jug*. La interesa kaj solena matena programo finiĝis per gajaj tostado kaj kunmanĝado de picoj.

Kaj nun pri la rutinaj **Enklubaj programoj**: dum la vendredaj vesperoj oni legis kelkajn ĉapitrojn el la “*Infero*” de Dante, komparante la Esperantan, italan kaj triestan versiojn. Estis spektitaj filmoj esperantlingvaj, filmoj aŭ fotoj pri Armenio, Brazilo, Triesto kaj Karsto, kaj Israelo. Oni esploris kelkajn gramatikajn problemojn kaj serĉadis vortojn pri sporto. *Edda Vidiz* prezentis alian sian libron “*Te se ricordi, Trieste*”.

Esperantistaj gastoj en Triesto: dum la jaro vizitis nin *Elda* kaj *Alessandro Corrado* el *Brescia*, *Folkmar Koller* el Vieno, kaj ankaŭ *Fany Rižnar* el *Izola*; en aprilo venis argentinano *Dolly Noemi Camusso* kaj, fine de julio, el Cagliari *Nino* kaj *Barbara Pala*; aŭguste, *Maria Butan* kaj la koreo *Hu Song*.

Pri kongresoj/konferencoj/renkontiĝoj. Januare, *Edvige* partoprenis en la 48^a Brazilo Kongreso en *Barra do Garças*; aprile, *Elda* ĉeestis la 7^{an} Azian Esperanto-Kongreson en Jerusalemo, Israelo; majo/junie, pli ol deko da triestanoj vizitis la 17^{an} E-Konferencon de Alp-Adrio en *Izola*; julio, *Elena* ĉeestis la UK-n en *Reykjavik*, Islando.

17-a Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio – Triesta Esperanto-Asocio kunlaboris kun ties organizantino *Fani Rižnar* en la preparado kaj prizorgado de la Konferenco, okazinta en *Izola*, Slovenio, de la 31^a de majo ĝis la 1^a de junio. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ trideko da esperantistoj.

26-an de majo – *Kaštelir*: vizito de s-ino *Kata Trampuh*, okaze de la morto-datreveno de nia kara Marĉelo, kune kun la geamikoj el *Rijeka*.


15-an de junio – Partopreno en *San Vito al Tagliamento* en ekspozicio, okazinta en Palaco *Altan*, pri “*La homo parolas Esperanton*”. Okazis ankaŭ prelego pri Esperanto far *Giacomino Martinez*. Estis eblo aĉeti individuan poŝtmarkon kaj bildkarton priesperantajn, eldonitajn de la loka Sekcio pri Filatelo kaj Numismatiko.

23-an de junio – Partopreno en *Izola* en la surstrata Festo pri vino kaj fiŝoj: gaja kunveno de esperantistoj el Slovenio kaj Triesto.

21-an de julio – Ni ĉeestis belan feston, jam tradician, ĉe nia asociano *Anita*.

24-an de aŭgusto – En *Lendava*, urbo norde de Slovenio ĉelandlima kun Hungario, okazis la Festo de *Bograč*, nome de Gulaŝo. Grupeto da slovenaj kaj triestaj esperantistoj elprovis sian lertecon en preparado de premio-merita gulaŝo. Partoprenintoj nombris pli ol 110 teamojn, kaj malgraŭ ke ni ne sukcesis gajni la unuan premion, ni estis premiitaj per intervjuo de ĵurnalistino kies artikolo aperis en la loka ĵurnalo. La vetero estis pluvega sed amuziĝo abundis.

8-an de septembro – Ni partoprenis en la Festo de Amikeco sur Monto Forno, kie ni renkontiĝis kun



Jen el la slovena libro "Butalci" de Fran Miličinski kromaj du rakontetoj pri la enloĝantoj de la urbo Butale, en la traduko de Janez Zadavec.

TURKOJ EN BUTALE

Butale estas fama urbo. Preskaŭ ĝi eniros la historion, kaj tiam la infanoj en la lernejoj devos lerni

pri Butale.

Okazis dum la tagoj, kiam la Turko, tiu miskreda aĉulo, timigis la landon, rabis la brutaron kaj la junularon.

Kaj oni ektimis, ke ankaŭ en Butale tiu miskreda aĉulo alvenos. Kaŭzon por timo ili havis, ĉar prave ili fieris pri sia bovida brutaro.

Post cerbumado ili decidis, ke sen batalo ili certe ne kapitulacos. Kontraŭe, sur la strato kondukanta al Butale ili starigos surskribon: "Al Turkoj malpermesita vojo!" Kaj anoncis sin vilaĝano dirante: "Ne estu ni leporoj sed kuraĝe ni skribu: «Severe malpermesita vojo!»" Je la fino estis entuziasme akceptita la opinio de la vilaĝestro, ke por la Turkoj nenian kompaton, kaj tial oni skribu: «plej severe malpermesata vojo!»

Sed en Butale lumas nur dum la tago, dum la nokto mallumas, kaj oni prave timis, ke Turkoj dumnokte alvenontaj tute ne vidos la severan malpermeson. Tial ili elektis gardiston kaj donis al li lancon por haltigi Turkon – tiun miskredan aĉulon. Kaj se Turko ne obeos, la gardisto vekigu la vilaĝestron kaj virojn, kaj ili plenumos sian honoron.

Sed dumnokte okazis, ke la gardisto havis stomakdoloron. Li flankensaltis en arbustejon por mildigi la aferon. La lancon li flankenmetis, malsuprenigis la pantalonon kaj ekkaŭris.

Ĝuste en tiu loko kreskis ankaŭ rubusoj, kaj kiam la gardisto volis ekstari, la pantalone restis enplektita. Morte timigita la gardisto ekkriis: "Aŭ, aŭ, la Turko kaptis min! Helpu, helpu!"

La vilaĝestro kaj la vilaĝanoj aŭdis la kriadon, suprensaltis kaj konsultiĝis. Tuj ili konstatis, ke la situacio ne taŭgas por konsultado kaj decidado, sed al la montaro ili fuĝis kaj tie tagon atendis. Dumtage pri la Turko nek spuro nek flaro.

Tial ili konstatis, ke la severa surskribo devas resti ĉar ĝi tute taŭgas; nur la rubusojn oni devas ek-

bruligi kaj plene forigi. Tiaj ili estas!

OVOJ DE ĈEVALINO

Estas sub la ĉielo multaj strangaĵoj, vivaj kaj mortaj, kaj neniu ĉiujn konas.

Tiel, la kukurboj estis iam tute nekonataj en Butale. Vojaĝante iam ekster sia glora urbo al alia, Butalano trafis bazaron. Tie li vidis amason da kukurboj kaj la komparanon kiu vendis ilin.

Butalano miregis: "kiaj pomoj kaj kiel grandega devas esti la arbo sur kiu ili kreskas." La kamparano, pensante ke la Butalano ŝercas, respondis al li: "Via ŝajno ne ĝustas, tio ne estas pomoj, sed ovoj de ĉevalino".

Ekinteresiĝas la Butalano: ĉu ovoj de ĉevalino, tiaj ke poste la ĉevalo kreskas? Tian beston ni en Butale ankoraŭ ne havas, do mi aĉetas unu paron!

La kamparano volonte vendis unu paron da kukurboj, eĉ elektis la plej grandajn kaj instrukciis la Butalano: "Ovojn vi devas hejme en la sterkon fosi, poste lasu ilin tie dum kvar semajnoj, kaj certe vi miregos pri la ĉevalidoj".

Tion zorge aŭskultis Butalano kaj ĉion bone komprenis. Li prenis ambaŭ kukurbojn kaj ekmarŝis hejmen. Tamen la kukurboj estis grandaj, pezaj, kaj sur la monteto antaŭ Butale li jam ege laciĝis. En la ombro de granda arbo li eksidis por ripozi kaj baldaŭ dormante eksonĝis pri siaj du ĉevaletoj. Tiam per unu gambo li ekmovis unu kukurbon, kiu ekruliĝis malsupren ĝis forta arbo, kie ĝi brue dispeciĝis. El la proksima arbusto tiam eksaltis timigita leporo kiu rapide forkuris.

Surprizita Butalano estis certa, ke la ĉevalido forkuris kaj tial milde vokis: "haltu, ĉevalido mia, mi pagis por vi, kaj jen por vi peco de pano plej bona." Tamen la leporo ne aŭskultis tiujn vortojn kaj baldaŭ malaperis. Ekĝemis la Butalano: kia domaĝo, tiel malgranda, krom la oreloj eĉ la vosto ne elkreskis, kaj tiel rapide jam kuris. Imagu la rapidecon de la plenkreska!

Tiel per unu kukurbo li hejmen revenis, enfosis ĝin en la sterkon kaj severe ordonis al la familianoj atendi kvar semajnojn. Post kvar semajnoj la tuta familio atente elfosis la kukurbon, sed ĝi estis plene putriĝinta kaj neniu spuro pri ĉevalido videblis.

Tiam la Butalano ekĝemis: imagu la malbonan sorton; el ovo bona la ĉevalido forkuris, kaj ĝuste la ovo hejmen portita estas putra!

NIA VIVO

Bildstrioj de Singer (Usono) – Komentoj de Viglo.

(daŭrigo el la antaŭa Bulteno)



MALJUNECO

Nun li povas plenmerite ripozi! Sed ... VIVTEMPO FORŝOVIĜIS!!!

FINO

Nia Viglo, ĉiam aktiva kaj ideoriĉa, deziras amuzi vin per tre interesa kvizaro, hazarde trovita funde de iu tirkesto en lia komputilo, plenŝtopita per senfina aro da cerbotikliloj, divenludoj, ĉiaspecaj cerbumigiloj, kaj li eĉ promesis premii la ĉion-solvonton per tre, tre interesa libro. Nu, amase partoprenu. Bonvolu sendi, aŭ havigi, al la sekretario la solvon antaŭ la 15^a de aprilo. Respondoj aperos en la venonta TEA-Bulteno!

Lingvo estas aventuro!

Ĉiutage vi ĝin uzas, foje eĉ iun fremdan vi studas. Sed kion vere vi scias pri lingvo, ja fascina kaj malfacila temo kiom neniu alia? Bv. respondi la demandaron iam aperintan en *ENCARTA* (ndr. - Reta enciklopedio, ne plu funkcia de 2009^a jaro), por kontroli viajn konojn.

1) Laŭ Biblio la lingva diverseco estis plago sendita de Dio, kiu tiel intencis puni la maltimon de la homaro, klopodinta konstrui turon ĝis la cielo altan - la Turon de Babelo. Maoria legendo, male, rakontas, ke diino *Iatuku* kreis malsamajn idiomojn por doni al homoj malpliajn okazojn por inter si kvereli. Ĉu vi scias, kiom da lingvoj estas nuntempe parolataj en la mondo?

- A) 500 ĉ.
- B) 1000 ĉ.
- C) pli ol 2000
- Ĉ) pli ol 4500

2) La plimulto da lingvoj parolataj en Eŭropo devenas el hindeŭropa lingvofamilio. Kiu el la ĉi subaj esceptas?

- A) Rumana
- B) Litova
- C) Hungara
- Ĉ) Albana

3) En Eŭropo ankoraŭ estas parolata lingvo kies lingvo-parencecoj kun aliaj idiomoj ĝis nun ne estas eltrovitaj; ĝi estas la plej antikva lingvo en Eŭropo, la ununura postvivinta la invadon de la hindeŭropaj popoloj. Pri kiu lingvo temas?

- A) Eŭska
- B) Gaela
- C) Galicia

Ĉ) Provenca

4) Oni parolas pri lingva prunto kiam temas pri vorto rekte transiĝinta de unu al alia lingvo, konservanta la fonetikajn karakterizojn de la originala. Ekzemplo estas la angla vorto "computer", nuntempe konata tra la tuta mondo. Alia lingva prunto estas la vorto "orangutan", el ekzota deveno. Kiu estas la origina lingvo?

- A) Taja
- B) Malaja
- C) Java
- Ĉ) Vjetnama

5) Ekzistas antikva hinda lingvo ankoraŭ nun uzata kiel literatura lingvo de la sacerdota kaj klera klasoj de Hindio. Kiu ĝi estas?

- A) Hinda
- B) Urdua
- C) Sanskrita
- Ĉ) Bengala

6) Tre malfacile oni povas difini, kiu estas la plej disvastiĝinta lingvo en la mondo: ĉar milionoj da homoj la anglan studas kaj parolas kiel duan lingvon, la idiomon de Shakespeare povus posedi tian rekordon. Se oni konsideras nur la lingvojn oficiale rekonatajn kiel naciajn, kiu estas la plej nombre parolata?

- A) Hispana
- B) Hindia
- C) Ĉina

7) Kiel nomiĝas la lingvistika fenomeno per kiu okazas falo de unu aŭ pli sonoj ene de vorto, kun sekva unuiĝo de du silaboj?

- A) Aferezo
- B) Enklizo
- C) Sinkopo
- Ĉ) Proklizo

8) En Egiptio retroviĝis, en 1799, bazalta tabuleto sur kiu estis gravurita teksto en tri malsamaj lingvoj. Tio ebligis deĉifri la surskribon de la antikvaj egiptoj: kiel nomiĝas tiu ĉi tabuleto?

- A) Steleo de *Luxor*
- B) Steleo de *Rosetta*
- C) Steleo de *Damietta*



Aŭspicie de la Kroatia Prezidanto Ivo Josipoviĉ

10-A KONGRESO DE EEU - 2014

6-A - 12-A DE JULIO 2014

RIJEKA - KROATIO

Kongresa temo: **Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj, malmultekosta demokratia komunikado**

Organizas: **Eŭropa Esperanto-Unio kaj Esperanto-Asocio Rijeka**

El la programo: Fakaj prelegoj pri la ĉeftemo: Inter la oratoroj, Milorad Pupovac, profesoro ĉe la Universitato de Zagrebo kaj membro de Kroatia Parlamento; Ivo Žaniĉ, Universitata profesoro en Zagrebo; Nikola Rašić, lingvisto kaj sociologo; Seán Ó Riain, irlanda diplomato, prezidanto de EEU.

El la kultura programo: Nacia vespero kun loka folkloro grupo "Zora"; Koncertoj de esperanta kaj kroata muziko; Marimba koncerto de Kaja Farsky; Operaj arioj kantataj de Neven Mrzlečki, el opero de Kroata nacia teatro en Zagrebo; Rok-opero en Esperanto fare de 'Teatro UMS' el Svislando; Teatraĵo "**Ne lasu min sola**", prezentota de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik... Krome okazos libro-prezentoj kaj ĉiutage funkcios libro-servo.

El turismajoj: Ĉiĉeronado tra Rijeka, ekskursoj en la ĉemara-montara regiono Primorsko-goranska županija; kvartaga antaŭkongreso en Norda Dalmatio kaj Lika.

Informoj pri loĝeblecoj, aliĝoj, ekskursoj k.a. ĉe: www.europo.eu ; <http://eeu-kongreso.webnode.com/>

Marta Programo	
4a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso
7a, vendredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Projekto Grundtvig 20h00 - Prezento de la Seminario en Tuluzo
11a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso
14a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de la libro 'LA KAPREOLIDO PIRGO', de A. Martić, en la traduko de Josipa Katunar
18a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso
21a, vendredo	20h00 - El la Esperanta gazetaro
25a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso
28a, vendredo	20h00 - Vortoj, terminoj, neologismoj... - trafoliumado de vortaroj

< daŭrigo de la 2-a paĝo

Martin Stuppig, ges-roj Zadavec kaj Kristan, kaj aliaj slovenoj.

19-an de septembro - En *Ilirska Bistrica*, ni ĉeestis kunvenon memore de *Tone Logar* kaj de la fondo-datreveno de la loka societo. Estis starigitaj du interesaj ekspozicioj pri ambaŭ.

Pri ekstera informado:

20-an de marto: intervjuo pri Esperanto de *Edvige* ĉe Tele4 - rubriko "Trieste in diretta".

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj kaj ĵurnaloj.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la alirprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 8 elsendoj pri diversaj temoj.

Pri ĝeneralaj asociaj informoj:

TEA-Bulteno: Daŭre aperas la ses-paĝa asocia informilo, ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversio ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

Estrarkunsidoj: dum la jaro oni kunsidis 3 fojojn.

Korespondado: en papera versio estis ricevita 12 leteroj kaj senditaj 11, kiuj troviĝas en siaj apartaj ujoj pri „Korespondado 2013“. Rete oni ricevis 48 mesaĝojn kaj sendis samnombrajn. Pro la Projekto Grundtvig estis interŝanĝitaj pli ol 250 mesaĝoj. Ĉiuj ret-mesaĝoj troviĝas en disketo, tiel ke en ĉiu ajn momento eblas ilin konsulti.

Plie, mi rememorigas al vi, ke por ĉiu aranĝo, spektaklo aŭ ajna okazaĵo estis preparitaj kaj presitaj invitiloj, broŝuroj, propagandiloj kaj afiŝoj grandaj aŭ/kaj malgrandaj.

Diversaĵoj:

CSV FVG: Dum la jaro oni partoprenis en kelkaj kunvenoj, zorge de la Volontul-Serva Centro de FVG, kies celo estas informi pri novaĵoj kaj pri uzablaj servoj, kaj ankaŭ en la ĝenerala Jara Asembleo.

Elda Doerfler

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;

www.karstajtagoj.altervista.org

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349

Aprila Programo	
1a, mardo	Sidejo fermita
4a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de la libro 'LA KAPREOLIDO PIRGO', de A. Martić, en la traduko de Josipa Katunar
8a, mardo	Sidejo fermita
11a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de la libro 'LA KAPREOLIDO PIRGO', de A. Martić, en la traduko de Josipa Katunar
15a, mardo	Sidejo fermita
18a, vendredo	20h00 - Raporto pri Kvartelio
22a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso
25a, vendredo	Festotago - Sidejo fermita
29a, mardo	17h30 - Dua-gradna kurso

GRUNDTVIG-PROJEKTO

Ĉu vi memoras pri kio temas? En la TEA-Bulteno de novembro-decembro 2013, unuapaĝe mi klarigis pri ĝi. Tiam en Triesto estis ĵus okazinta la unua projekta seminario dediĉita al konatiĝo kun interretaj ilaro kaj programoj kaj pliperfektiĝo en ties uzado. La dua rendezuo estis en Tuluzo, Francio, kie de la 20^a ĝis la 24^a de februaro 28 ĉeestantoj estis trejnita pri organizado de spektakloj kaj hommastrumado. La tuto estis tre brile aranĝita de Floréal Martorell (Eurokka-Vinikosmo) surloke helpata de vigla teamo.

La ĉefa temo estis: "Hom-mastrumado, mastrumado de volontulaj teamoj", gvidita de Cyrille Hurstel, dum la subtemo "Organizado de spektaklo", estis teorie pritraktita de s-ro Martorell helpe de trafaj bildoj kaj skizitaj ĉefpunktoj. Vespere la teoriumado estis praktikita per konigo de la necesaj sonteknikaĵoj por organizi koncerton, per partopreno en la sonprovoj kaj, fine, per spektado de la koncertoj de JoMo kaj de Sepa & Asorti.

La seminario pri hom-mastrumado okazis dum sabato kaj dimanĉo, matene kaj posttagmeze, kaj kvankam la temo ne estis la plej simpla, tamen ĉiuj, danke al lerta gvidado kaj klarigado de Cyrille Hurstel, sukcesis enkapigi ĝiajn nefacilajn enhavojn. Kio plej interesis min estis la aplikado de tiuj teorioj en la realaj situacioj, kiujn foje oni alfrontas sed ne kapablas ilin precize finfari pro ia mensa barilo. Estis interalie prezentita iu cirkonstanco, kiun multfoje mi devis aliri dum mia esperantista engaĝiĝo, nome la organizo de akcepteja servo. Oni praktike lernis kiel aranĝi la projekton, kiel ĝin detaligi laŭ kiuj sinsekvaj fazoj, kiaj estas la bezonoj kaj kie troviĝas kutime la mankoj. Krome oni diskutis pri alia tre grava problemo, kiu staras antaŭ oni ĉiutage, aperanta ĉiutage je vekiĝo, nome la tempo-mastrumado kaj -planado. En la hodiaŭa mondo oni multon parolas pri streĉiteco kaj streso, kaŭzantaj ĉefe de la troa rapida vivmaniero. Tio povus - iom post iom - eĉ alkonduki homon al serioza nervo-malsaniĝo. Dum la trejnado la gvidanto tre trafe klarigis, listigante la diversajn punktojn, pri kiel sisteme eviti tion. Kaj ĉio ĉi estis nur eta parto de la plurhore daŭrinta seminario. Do, entute ĝuinda, kleriga, pensiga trejnado, kiu tutcerte estos tre utila al ni ĉiuj dum venontaj tempoj.

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2013 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Il Presidente

(Edvige Ackermann)

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320